

La Simpla Savoplano de Dio

Mia amiko: mi metas al vi la plej agravan demandon de la vivo. Via ĝojo aŭ malĝojo por **ETERNE** dependas de ĝi. La demando estas la jena: Ĉu vi estas **SAVITA**? Ne temas pri tio, ĉu vi estas ano de iu eklezio, sed ĉu vi estas **SAVITA**. Ne temas pri tio, kiel bona vi estas, sed **ĈU VI ESTAS SAVITA**. Neniu povas ĝui la benojn de Dio aŭ iri al la ĉielo sen esti savita. Jesuo diris al Nikodemo en Johano 3:17 **“VI DEVAS DENOVE NASKIĜI”**. Dio donas al ni en Sia Vorto la **SOLAN** planon por Savo. La Plano estas simpla, vi povas esti savata **HODIAŬ**.

Unue, mia amiko, vi devas ekkoni, ke **VI ESTAS PEKULO**.

Romanoj 3:10–“Ne ekzistas justulo, **NE EĈ UNU**.”

Romanoj 3:22,23–“Ĉar ne ekzistas diferencigo; ĉar **ĈIUJ** pekis kaj maltrafis la gloron de Dio.”

Ekzistas **NENIU ŜANCO** esti savata, se vi ne ekkonas, ke vi estas **PEKULO**.

Pro tio ke vi estas pekulo, vi estas **KONDAMNITA AL MORTO**.

Romanoj 6:23–“Ĉar la salajro de peko estas morto.”

Jakobo 1:15–“Kaj la peko, maturiĝinte, naskas morton.”

Tio signifas disiĝon de Dio en la **INFERO POR ĈIAM**. Kiel terura estas tio. Jes, mia amiko, sed estas la vero. Tamen Dio tiel amis vin, ke **LI DONIS SIAN SOLENASKITAN FILON**, Jesuon Kriston, **ANSTATAŬ VI**, kiu portis **VIAN** pekon, kaj mortis en **VIA** loko.

2 Korintanoj 5:21–“**TIUN**, kiu ne konis pekon,

Li faris **PEKO** pro **NI**; por ke **NI FARIĜU JUSTECO** de dio en **LI**.”

1 Petro 2:24–“**LI MEM** portis **NIAJN** pekojn en **SIA** korpo sur la lignaĵo, por ke **NI**, malvivigite koncerne pekojn, vivu por justeco; per lia vundo **VI RESANIĜIS**.”

Ni certe ne povas kompreni, kiel nia peko estis metata sur Jesuon, sed Dio diras tion en **SIA VORTO**. **TIEL VIA PEKO**, mia amiko, estis metata **SUR JESUON** kaj **LI MORTIS EN VIA LOKO**. Tio estas vera. Dio ne povas mensogi.

La malliberejestro de Filipi demandis Paŭlon kaj Silason: “Kion **ME DEVAS FARI** por esti **SAVITA**?”

Agoj 16:31–“Kaj ili diris: **KREDU** al la sinjoro Jesuo, kaj **VI ESTOS SAVITA**, vi kaj via familio.”

Simple kredu al Li kiel al tiu, kiu portis **VIAN PEKON** kaj **MORTIS EN VIA LOKO**. Nun alvoku **LIN**.

Romanoj 10:13–“Ĉar ĉiu, kiu vokos la nomon de la Eternulo, saviĝos.”

La unua preĝo, kiun **PEKULO** preĝu, estas trovebla ĉe Sankta Luko 18:13–“Ho Dio, estu favora **AL MI PEKULO**.” Vi do estas pekulo kaj certe malĝojas pri tio. Ĝuste **NUN**, kie ajn vi levas vian koron al Dio en preĝo. Vi ne bezonas longan, laŭtan preĝon, ĉar Dio **DEZIREGAS** savi vin. Diru nur: Ho Dio, mi esatas pekulo kaj mi malĝojas pri tio. **KOMPATU** min kaj **SAVU** min pro Jesuo. Nun fidu al **LI** kaj Lia vorto.

Romanoj 10:13–“Ĉar **ĈIU** (tio inkluzivas vin), kiu vokos la nomon de la Eternulo, **SAVIĜOS**.”

Ne estas dirite, ke li povas saviĝi, sed ke li certe **SAVIĜOS**.

Fidu al la **VORTO** de Dio. Kiam vi faris, kion Li postulas de vi, **PRETENDU SAVON PER FIDO**, laŭ **LIA VORTO**. **KREDU KAJ VI SAVIĜOS**. Neniu eklezio, neniu loĝio, neniuj bonaj faroj, **NENIU KAJ NENIO POVAS SAVI VIN KROM JESUO SOLA**.

La simpla savoplano estas la jena: **VI ESTAS PEKULO**; ĉar vi estas pekulo, vi **DEVAS MORTI**, se vi ne kredas al Kristo, kiu estis **VIA ANSTATAŬULO** kaj mortis en **VIA LOKO**. Alvoku **LIN**, **EKKONANTE**, ke vi estas pekulo, kaj petu Lin ekhavi kompaton al vi kaj savi vin **PRO JESUO**. Poste fidu **AL LIA VORTO** kaj **PRETENDU SAVON PER FIDO**. Vi diros: “Certe tio ne estas ĉio, kio estas necesa por esti savita.” Tamen estas Absolute ĉio. Dank’ al Dio multaj

estas gajnitaj por Kristo per ĉi tiu simpla plano.

Ĝi estas **LAŬBIBLIA, ĜI ESTAS LA PLANO DE DIO**. Mia amiko, **KREDU TION KAJ SEKVU ĜIN HODIAŬ**. Nun estas tempo—Hodiaŭ estas la tago.

2 Korintanoj 6:2—“Jen **NUN** la tempo de favoro, jen **NUN** la tago de savo.”

Sentencoj 27:1—“Ne fanfaronu pri la morgaŭa tago; ĉar vi ne scias, kion naskos la tago.”

Se tio ne estas tute klara, **LEGU ĜIN DENOVE** kaj **DENOVE**; ĝis vi komprenos ĝin. Ne flankenmetu ĉi tiun traktaton, ĝis vi komprenos. **VIA ANIMO** estas pli valora ol la tuta mondo.

Marko 8:36,37—“Ĉar kiel profitus homo, se li gajnus la tutan mondon kaj perdus **SIAN ANIMON**? Ĉar kion homo donu interŝanĝe por sia animo?”

ESTU CERTA, VI ESTOS SAVITA. VI BEZONAS SAVON PLI OL ION ALIAN. SE VI PERDAS VIAN ANIMON, VI MALTRAFAS LA ĈIELON KAJ PERDAS ĈION. DIO HELPU VIN ESTI SAVATA HODIAŬ.

Li savos kaj **GARDOS VIN**.

NE fidu al viaj sentoj. Ili ŝanĝiĝas. **STARU** sur la **PROMESOJ DE DIO**. Ili **NENIAM** ŝanĝiĝas.

POST KIAM VI ESTAS SAVITA, EKZISTAS TRI AFEROJ, KIUJN VI DEVAS ĈIUTAGE PRAKTIKI POR VIA SPIRITA KRESKADO:

PREĜU—Vi parolas al Dio. **LEGU VIAN BIBLION**—Dio parolas al vi. **ATESTU**—Vi parolas por Dio.

Mateo 10:32—“Ĉiun do, kiu konfesos min antaŭ homoj, mi ankaŭ konfesos antaŭ mia Patro, kiu estas en la ĉielo.”